Malgranda miraklo

Vortoj kaj muziko de
Ĵomart Amzeev

En mia hejmo loĝas delonge
Malgranda miraklo
Ŝi ĉiam ridetas, neniam mensogas
Kaj ofte spektaklas.
Kaj se mi havas malbonan humoron
Kaj laca mi estas
Kuracas min la mirakla aktoro
En miraklaj vestoj.

Miraklo kantetas malgajajn kantojn
Se mi sopiras,
Aŭ simple silentas apude sidante
Se mankas inspiro.
Ni ambaŭ ne ŝatas multe paroli
Pri tagaj aferoj
Kaj televidilon rigardi ne volas
Ni ambaŭ vespere.

Rf : Mi ĝuste ne scias de kie aperis
Miraklo ĉarma.
Sed kune kun ŝi aperis espero
En mia ĉambro.

Jes, pli facile por mi estas vivi
Kun ŝiaj petoloj
Mi trompas min, mi kredas naive
Ke mi estas ne sola.
Sed ĉiuvespere mi hejmen rapidas
Kaj ĉiuvespere
Mi timas ke iam ŝi diros – *Adiaŭ!*
Kaj malaperos.